

Eta biografio de ALLAN KARDEC

ALLAN KARDEC estis la pseudonimo de Hippolyte Léon Denizard Rivail, naskita en Lyon (Franclando) la 3-an de Oktobro 1804, en klera familio. Ankoraŭ tre juna, li estis altirita de la sciencoj. Li faris siajn unuagradajn studojn che la Lernejo de Pestalozzi, en Yverdun (Svislando); de tiu mondkonata edukisto li estis unu el plej distingitaj lernantoj kaj de ties edukmetodo li estis plej diligenta propagandisto; aghante nur dek-kvar jarojn, li lernigadis al siaj kolegoj tion, kion li iom post iom ricevadis de siaj instruantoj. La knabo estis edukita en protestantismo, sed, pro intimaj sentoj, li baldau ekpensis ian religian reformon kaj serchis, de tiam, ian rimedon por unuigi la kredojn; tian rimedon li trovis en Spiritismo.

Li estis membro de pluraj akademioj, inter kiuj la Regha Akademio de Arras. De 1835 ghis 1840 li faris, en sia hejmo, senpagajn kursojn pri fiziko, kemio, anatomio, astronomio k.a. Antaŭ ol sin dediĉi al la studado de la spiritismaj fenomenoj, Kardec laboradis do sur pluraj kampoj de la homa agado kaj postlasis pri tiuj plej diversajn verkojn.

En 1855, kiam la manifestighoj de la Spiritoj komencis esti studataj, Kardec ilin serioze ekatentis; lia genio tie tuj ekvidis faktojn, kiuj ekstreme interesus la homon, kaj la principon de novaj naturaj leghoj, nome de la leghoj, lau kiuj farighas la rilatoj inter la videbla kaj la nevidebla mondoj; li konstatis, en la manifestighado de la nevidebla mondo, unu el la naturaj fortoj, kies konado solvus multe da problemoj, pro sia strangeco konfuzantaj la homan spiriton. El la "parolantaj tabloj", el laushajne senkaŭzaj frapoj, el la neklarigeblaj movoj de objektoj kaj el multaj aliaj okazoj tiaspecaj, Kardec, kiu samtempe studadis magnetismon, kolektis elementojn sufichajn por verko: la 18-an de Aprilo 1857 venis en lumon la unua eldono de "La Libro de la Spiritoj", lia unua verko pri la afero Spiritismo. Ghin sekvis: "La Libro de la Mediumoj", Januaro 1861; "La Evangelio lau Spiritismo", Aprilo 1864; "La Chielo kaj la Infero", au "La Justeco de Dio lau Spiritismo", Augusto 1865; "La Genezo, la Mirakloj kaj la Antaŭdiroj", Januaro 1868, k.a. La 1-an de Januaro 1858 li fondis "La Revue Spirite"; la 1-an de Aprilo de tiu sama jaro li fondis, en Parizo, la unuan spiritisman societeton regule starigitan, sub la nomo "Société Parisienne des Études Spirites", kies ekskluziva celo estis la studado de chio ajn, kio povus helpi la progreson de tiu jhus naskita scienco.

Nenion li konkludis sen longa observado; kaj de sia zorga, skrupula observado li deduktis la leghojn de la tiel nomataj spiritismaj fenomenoj. Li pruvis, ke "supernaturaj" faktoj neniel ekzistas, char, efektive, chiu fenomenoj entenighas en la Naturo mem.

La 31-an de Marto 1869 la Spirito de Allan Kardec forlasis sian karceron. Dum sia tuta vivo li tenis stardon kun la devizo: "laboro, solidareco, toleremo"; kaj por Spiritismo li starigis la principon: "Ekster karitato ekzistas nenia savo". Li ja komprenis la naturajn leghojn: ni peni sekvi liajn pashosignojn.

Luís da Costa Porto Carreiro Neto
(el la "Prezento" de *La Libro de la Spiritoj*)

